


GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 350 jaroj mortis en Stratford on Avon :
WILLIAM SHAKESPEARE. — Tipa reprezentanto de la angla Renesanco, William Shakespeare estis aktoro, dramverkisto kaj kunposedanto de la Globe Theatre en Londono. Liaj verkoj staras ĉe la supro de la okcidenta dramaturgio. Ĝi entenas ne nur komediojn sed ankaŭ tragediojn, mirtetraĵoj.



Antaŭ 65 jaroj naskiĝis en Augsburg :

WERNER EGK. — Tiu bavara komponisto klopodis dum sia tuta vivo renovigi la operon konforme al nia epoko. Krom diversaj operoj (« La Ensorĉita Violono », « Peer Gynt »), kies tekstojn li ankaŭ skribis, li komponis efikoplenan balet-muzikon (Abraxas).



Antaŭ 50 jaroj mortis en Leipzig :

MAX REGER. — La komponaĵoj de Max Reger situas inter malfrua romantismo kaj moderna muziko. Lia vasta verko, kantoj, komponaĵoj por orgeno kaj orkestro, ĉambromuziko, estas influita de la polifonio de la baroka epoko de Bach.